

Kapriol! - Niewelnacht Lieten

Bunta elekto el preskaŭ forgesitaj Frisaj kantoj

En ĉi tiu KD la muzikgrupo Kapriol! prezentas kantojn kaj danĉmelodiojn bazitajn sur malnovaj Frisaj fontoj. El ĉi tiu preskaŭ forgesita repertuaro, la grupo kreis buntajn, liberajn prilaboraĵojn. Ĉe tio ilin influis multaj muzikstiloj el diversaj regionoj kaj epokoj, kiel folko, renesanco, mezepoko, Kelta epoko, popo, ktp. Kapriol! do uzas la forton de la tradicio, sed muzike ili volonte kapriolas.



Per ĉi tiu KD Kapriol! peras al vi **Frisan muzikon el pasintaj jarcentoj**. La du kantoj kun la plej malnovaj konservitaj Frislingvaj tekstoj el la 12a jarcento estas prezentitaj en la Malnovfrisa lingvo de tiu tempo. La tekstoj el postaj jarcentoj estas prezentitaj en la originala Frisa dialekto (n-ro 14, *It ballast sjotten*) aŭ tradukitaj al la moderna Frisa lingvo. La kanto *Sil ik dy ris* el 1602 (n-ro 3) de Jacques Vredeman de Vries estas unu el la dek unu Frisaj vilaneloj. Temas pri la plej malnovaj Frislingvaj kantoj kies muziko estas ankoraŭ konservita, sed kiuj ĝis nun ne aperis sur KD. La ceteraj kantoj kaj danĉmelodioj sur ĉi tiu KD ĉerpiĝis el aliaj, pli konataj 17-, 18- kaj 19-jarcentaj Frisaj fontoj, kiel la kantaroj kaj manuskriptoj de Starter, Japicx, Halbersma kaj Waling Dykstra.

La kantoj sur la KD estas ordigitaj laŭ kvin temoj reaperantaj en ĉiuj jarcentoj: infanoj, amo, paco, festoj, akvo kaj ŝipveturado.

La Kapriolanoj antaŭe aktivis en diversaj aliaj muzikgrupoj (kiel Kalis, Kat yn't Seil kaj Blue Tape Band), kio donis al ili valoregajn spertojn kaj vastajn muzikajn kapablojn. Rimarkindaj estas la senakompana kantado, svingaj danĉmelodioj, surprizaj aranĝoj kaj nekutimaj muzikiloj kiel ŝalmo, vjelo kaj Skandinava salikoflutoj.

La Kapriolanoj estas:

Marita Kruijswijk: flutoj, ŝalmo, krumorno, kuleroj, kantado
Marian Nesse: akordiono, vjelo, kantado
Rutger Dijkstra: gitaro, mandolino, citaro, basgitaro, violono, kantado
Ad Bos: frapskatolo kaj aliaj perkutiloj, klavarinstrumentoj, kantado

Kapriol! koncertas ne nur en Nederlando, sed ankaŭ alilande kaj la grupo sin ofte prezentas en internaciaj festivaloj. Kapriol! plurfoje ludis en Usono, Francujo, Germanujo, Danlando kaj Pollando. La grupo prezentas ne nur koncertojn aŭskulteblajn en la Nederlanda, Frisa kaj Esperanto, sed ankaŭ programojn por balfolkaj dancvesperoj, maristaj eventoj kaj mezepokaj festoj.

La Nederlandlingva versio de la KD-libreto estas legebla en la retejo de Kapriol!

Retejo: www.kapriol.org

Kontaktulo: Marita Kruijswijk
Kerkstraat 32, 8433 LJ Haulerwijk, Nederlando
Telefono: +31-516-421612 aŭ +31-6-5122297
Retpoŝto: marianta@xs4all.nl

Facebook: www.facebook.com/pages/Kapriol/143310325728555

YouTube: www.youtube.com/user/Kapriolfolkmusic/videos

I Infanoj

1. 't Kijnd

Teksto: el la manuskripto de Fivelgo (12a jarcento)

Muziko: Rutger Dijkstra

Ĉi tiu Malnovfrisa teksto estas jura teksto el *Codex Fivelgo*. En la frua kaj alta mezepokoj tiaj leĝaj tekstoj estis solene deklamataj de leĝparolanto. Li estis la oficiala jura konsilisto (*asega*) de la tribunalo, sed la ĉeestantaj kunsidantoj de la popolo (*ding*) povis decidi alie. Tiam la decido de la ĉeestantaro superis tiun de la konsilisto. Pliaj priaj informoj legeblas en la Nederlandlingva libro *Asega is het dingtijd?* de Oebele Vries.

La teksto de *'t Kijnd* (La infano) temas pri la 'tria urĝa situacio' kiu preskribas kion fari kiam senpatra neplenaĝulo vintre riskas esti elmetita al la *tiostere niewelnacht* (obskura nebula nokto). Tiukaze la patrino uzu la heredaĵon destinitan por la infano, ĉar ŝi devas protekti kaj prizorgi sian infanon. Tre speciala pri ĉi tiu leĝa teksto estas, ke ĝi priskribas la situacion de la senpatra infano en tre bildiga kaj emocia maniero.

2. Hynste Polka/ Hop hop Hinke

Teksto: el Het Spel van Moeder en kind. Oude kinderrijmen voor jonge ouders (1936) de Sjoukje M.D. Troelstra-Bokma de Boer kaj Jop Pollmann.

Muziko por la instrumenta parto: Marian Nesse

Muziko por la kanta parto: Marian Nesse, surbaze de tradicia infankanto.

La infankanton *Hop hop Hinke*, kiu estas parto de ĉi tiu muzikaĵo, kantis gepatroj kaj geavoj kiam ili metis la filon, filinon, nepon aŭ nepinon sur la genuon por 'rajdi ĉevalon'. Estas ankoraŭ multaj Frisoj kiuj konas ĉi tiun kanton en diversaj variaĵoj. En la senteksta parto aŭdeblas la ritmo de ĉevalo.

II Amo

3. Sil ik dy ris

Teksto kaj muziko: el Musica Miscella (Franeker 1602) de Jacques Vredeman de Vries

Muziko por la mankanta alda voĉo: Marita Kruijswijk

Ĉirkaŭ la jaro 1600 floris la Frisa muzikkulturo. En Levardo (*Leeuwarden*) ekzistis ekzemple la *Collegium Musicorum* gvidata de la komponisto kaj muzikinstruisto Jacques Vredeman de Vries (1558-1621). Li verkis la kantaron *Musica Miscella* kun kvar- kaj kvinvoĉaj kantoj, inter kiuj ne nur Italaj madrigaloj kaj Francaj kantoj, sed ankaŭ dek unu Frisaj vilaneloj. Ili estas Frisingvaj erotike malkaŝemaj kantoj surbaze de tekstoj de anonima poeto. En ĉi tiu kanto iu provas persvadi la heziteman amatinon partopreni en frivolaj ludoj.

4. Fryske Pastorel

Teksto: el Friesche Lusthof (Levardo 1621) de Jan Jansz. Starter

Muziko: Ad Bos, surbaze de la melodio de La Dolphine, menciita de Starter

Alia gravulo en la 17-jarcenta Frisa muzikkulturo estas la poeto Jan Jansz. Starter (ĉ.1594-1626). Li naskiĝis en Amsterdamo, vivis dum sia junaĝo en Harlingen en ree loĝis en Amsterdamo de 1612 ĝis 1614 kie li kunlaboris kun interalie Bredero. Komence de 1614 li reiris al Frislando kaj establis sin tie kiel librovendisto en Levardo, kie li aktivis en la retorikejo (*rederijkerskamer*). En 1621 aperis lia poemaro *Friesche Lusthof* kun melodi-indikoj. En ĝi rimarkindas la internacieco de la melodioj. La kantaro enhavas ne nur multajn Nederlandlingvajn tekstojn, sed ankaŭ du pastorecajn Frisajn tekstojn. Unu el ili estas *Fryske Pastorel*, en kiu viro hazarde renkontas la amatan knabinon Jetske promenanta sole en la naturo. Li eluzis la okazon kaj deklaris sian amon al ŝi. Kaj se ŝi reagus pozitive, li donus al ŝi plej diversajn aferojn, kiel multaj kisoj, belaj vestaĵoj kaj ornamaĵoj.

5. Jaan is leafde

Teksto: el Friesche Rymlerye (Bolsward 1668) de Gysbert Japicx

Muziko: Rutger Dijkstra, surbaze de la melodio de Mijne Herp bekleedt met rouwe, menciita de Japicx.

Plej grandan parton de la 17-jarcentaj Frisaj kantotekstoj verkis la poeto Gysbert Japicx (1603-1666).

Li venis el Bolsward kaj fariĝis instruisto, unue en Witmarsum kaj de 1637 ĝis sia morto en la civila lernejo por knaboj en Bolsward. Li havis kontaktojn kun Holandaj kaj Anglaj verkistoj kaj sciencistoj. Li estis ankaŭ kantoro de la Martini-preĝejo en Bolsward. Same kiel liaj edzino kaj filo li mortis en 1666 pro la pesto.

La lingvoj de lia junaĝo estis la Urbfrisa lingvo de Bolsward kaj la Nederlanda. Komence li poemis nur en la Nederlanda, sed en 1639 eldoniĝis lia unua Frisa poemo, la geedziĝa poemo *Friesche Tjerne*. Ĉi tiu eldonaĵo montriĝis granda sukceso kaj de tiam Japicx poemis nur Frisingve.

En la kanto *Jaan is leafde* (Doni estas amo) virino plendas, ke ŝia amato ŝin nomas ŝtelistino, ĉar ŝi daŭre ŝtelas kisojn de li. Sed laŭ ŝi veras la kontraŭo: ŝi ne prenas, sed donas kisojn, dum li mem estas ŝtelisto, ĉar li ŝtelas ŝian koron.

6. Pales

Teksto: el Friesche Rymlerye (Bolsward 1668) de Gysbert Japicx

Muziko: Marian Nesse, surbaze de la melodio de Cordewagen, menciita de Japicx.

Ankaŭ ĉi tiun kanton verkis Gysbert Japicx (vd. n-ron 5). Kiel *Fryske Pastorel* de Starter ĝi estas ekzemplo de arkadia poezio. *Pales* estas odo al Paleso, la Romia diino de la amo kaj de ĉio kio rilatas al la kampara vivo. La poemo estas samtempe ankaŭ plendo kontraŭ Marso, la Romia dio de la milito, ĉi-kante prezentita kiel la eterna malamiko de la amo.

7. Breidsdûns 'Trouwen'

Muziko: Marian Nesse, surbaze de Trouwen, n-ro 51 el la manuskripto de Wieger Michiels Visser (ĉ. 1819).

Konserviĝis kelkaj 19-jarcentaj Frisaj manuskriptoj kun dancmelodioj. Unu el ili estas tiu de Wieger Michiels Visser (1801-1886) el Oosterzee. Profesie li ne estis stratmuzikisto, sed riĉa riverŝipestro. Li notis la melodiojn eble ne nur por si mem, sed ankaŭ por transdoni ilin al junaj muzikistoj. La manuskripto enhavas 101 melodiojn dividitajn en suitojn konsistantajn el ĉirkaŭ sep dancoj, ĉefe por unu violono, kaj kelkfoje por du violonoj. La suitoj estas notitaj inter 1817 kaj 1821. La suitoj notitaj en 1817 konsistas el menuetoj, slejveroj, alemandoj, Angla kampardanco, valso, bureo kaj serio da marŝoj. En 1819 Visser notis suitojn en kiuj aperis ne nur Angla kampardanco, valso kaj alemando, sed ankaŭ madlotoj, kontraŭdancoj kaj skotiŝoj. La dancmelodio *Trouwen* (Geedziĝi) origine havas madlotan strukturon (vd. n-ron 10).

III Paco

8. Free-bea

Teksto: el Friesche Rymlerye (Bolsward 1668) de Gysbert Japicx

Muziko: Marian Nesse, surbaze de la melodio de Schoonste Herderinne, menciita de Japicx.

Ankaŭ ĉi tiu kanto estas prenita el la kantaro de Gysbert Japicx (vd. n-ron 5). La teksto, kiu verkiĝis verŝajne je la fino de la Okdekjara Milito, ĉirkaŭ la tempo de la Paco de Monastero, pasie alvokas al paco: neniam plu milito!

IV Festoj

9. De Lêste Skeaf

Teksto: anonima verko el Frislingva almanako (Levarado 1777), aperinta en De Friese Tjalk de S.J. van der Molen (1970).

Muziko: Marian Nesse, surbaze de la melodio de Vrieunship, kiel menciita en la almanako.

En la 18a jarcento oni kantis ĉi tiun kanton en Frislando rikoltinte *de lêste skeaf* ('la lastan garbon'). Tiam oni abunde festis en la bieno. Ĉiuj geservistoj estis regalataj per bongustaĵoj kiel krespoj kun lardo, biero kaj sukerita brando. Ĉiuj ricevis ankaŭ saketon kun mono kiel salajro por la finiĝinta sezono. Tio estis kialo por granda festo dum kiu oni multe kantis kaj dancis.

10. Madlotoj

Muziko: Rutger Dijkstra, surbaze de madlotoj 74, 75 kaj 49 el la manuskripto de Wieger Michiels Visser (ĉ. 1819).

Madloto estas kontraŭdanco en takto 6/8 kiun en 1706 unuafoje priskribis baletestro de la korto de Ludeviko la 14a. Li nomis tiun dancon *La Matelote*, verŝajne laŭ la Franca vorto *matelot*, kiu signifas 'matroso'. Eble lin inspiris tiutempa matrosa danco. Poste la madloto disvastiĝis interalie en Anglujo kaj ĉirkaŭ 1800 ĝi iĝis konata en Nederlando sub la nomo *madlot*. Tiel retroveblas madlotoj ankaŭ en la Frisa manuskripto por stratmuzikistoj de Wieger Michiels Visser, vd. n-ron 7.

11. Brandewijn / In nij liet op Grouster merke / Het zal wel gaan

Muziko por la instrumenta parto: Marian Nesse, surbaze de Brandewijn met Zuiker (n-ro 36) kaj Het zal wel gaan (n-ro 40) el Andries Kiers Zijn Muzijk boek (1864).

Teksto de In nij liet op Grouster merke: el Rimen en Teltsjes (1871) de la fratoj Halbertsma.

Muziko: Marita Kruijswijk surbaze de la melodio de Het zal wel gaan el Andries Kiers Zijn Muzijk boek (1864).

La Frisa stratmuzikisto Andries Kiers naskiĝis en 1851 en Noordwolde kiel filo de trinkejestro. Kiers estis, malkiel Visser (vd. n-ron 7), tute ne riĉa. Inter 1877 kaj 1898 li estis kelkfoje laborigita en ŝtata laborkampo pro vagabondado kaj almozpetado. En 1898 li migris al Germanujo (al la ĉirkaŭaĵo de Essen). Poste oni ne plu aŭdis pri li.

La eldon-dato de la manuskripto por stratmuzikistoj de Andries Kiers estas 1864. Sed tiam Kiers havis nur 13 jarojn, dum la manskribaĵo ŝajnas esti de sperta muzikisto. Eblaj klarigoj estas, ke li ricevis la muziklibron de pli aĝa muzikisto, aŭ ke en 1864 li ricevis malplenan kajeron kiun li nur poste plenigadis. Pli ol ĉe Wieger Visser (vd. n-ron 7) la repertuaro de Kiers konsistis ĉefe el liatempe kutimaj melodioj konataj el parola tradicio.

La muziklibro enhavas sepdek dancmelodiojn dividitajn en suitojn de ĉirkaŭ kvin dancoj por unu violono. La dancoj aperantaj en ĉi tiuj suitoj estas: kvadrilo, valso, hornpipo, skotiŝo, menueto, marŝo, hopso, alemando, polko, galopo kaj mazurko. La unua suito estas la plej tradicia. La dancmelodio *Brandewijn met Zuiker* (Sukerita brando) estas unu el la skotiŝoj.

Konataj 19-jarcentoj poetoj estis la fratoj Halbertsma. Eeltsje Halbertsma verkis la tekston de *De âlde Friezen*, kiu poste iĝis la oficiala Frisa himno. Ili verkis interalie ankaŭ *In nij liet op Grouster merke*. Tiun tekston oni kantu laŭ la skotiŝmelodio de *Het zal wel gaan*. Ĝi prikantas la plezuron de festado kaj skotiŝdancado.

V Akvo kaj ŝipveturado

12. See-eangst

Teksto: el Friesche Rymlerye (Bolsward 1668) de Gysbert Japicx

Muziko: Marita Kruijswijk, surbaze de la melodio de Yets moet ik u Laura vragen, menciita de Japicx.

Ankaŭ la kanton *See-eangst* (Martimo) verkis la 17-jarcenta poeto Gysbert Japicx (vd. n-ron 5). Ĝi temas pri patrino kiu tre maltrankviliĝis pro la planoj de sia filo. Li ne plu ŝatas la farmistan laboron kaj nepre volas ŝipveturi. La patrino priskribas per ardaĵ vortoj la danĝerojn de la marista vivo kaj la belecon de la surlanda vivo. Sed vanas ŝiaj klopodoj ŝanĝi la planojn de la filo.

13. Pas op!

Teksto: el Fríske Sang, Nij Lieteboek mei fjirtich Sangen (Franeker 1874) de Waling Dykstra

Muziko: Marita Kruijswijk, surbaze de tradicia Nederlanda kanto Wie in januari geboren is, laŭ kiu Waling Dykstra faris la tekston.

Muziko por la instrumenta parto: Marita Kruijswijk, surbaze de skotiŝo 12 de Andries Kiers zĵijn Muzijk boek (1864).

La plej konata verkisto pri la Frisa kulturo kaj poeto el la 19a jarcento estis Waling Dykstra (1821-1914). Dykstra unue estis bakisto kaj vendisto, sed de kiam li ekloĝis en Franeker en 1855, li sukcesis perlabori sufiĉe por vivteni sin per verkado, prelegado kaj laborado ĉe tiea librovendejo/eldonejo. En 1861 li mem fariĝis librovendisto en Holwerd. En 1874 Dykstra publikigis la kantonon *Fríske Sang* kun propraj kantotekstoj laŭ duvoĉe notitaj konataj popolmelodioj. La plej konata el ili estas *Wat bistû leaflik, rizende simmermoarn* (Kiom vi karas, leviĝanta somermateno). Ankaŭ la kanto *Pas op!* (Atentu!) estas el ĉi tiu libro. La teksto enhavas la jenan averton: atentu, la maro povas esti tre danĝera, precipe kiam oni veturas per ŝipo kun alta masto kaj grandaj veloj. La ŝipo estis metaforo por altranguloj kiuj estu tre singardaj. Aŭ: altan arbon batas la fulmo.

14. It ballast sjotten

Teksto: tradicia teksto de la insulo Schiermonnikoog, notita ĉirkaŭ 1900 kaj publikigita en De Friese Tjalk de S.J. van der Molen (1970).

Muziko: Marian Nesse surbaze de tradicia melodio publikigita en De Friese Tjalk.

Ĉi tiu tradicia marista-laborista kanto estas en la dialekto de la Vadomara Frisa insuleto Schiermonnikoog. Ĉiujn strofojn kantas kantoro kaj la rekantaĵon la tuta ŝipanaro. Komence la maristoj de Schiermonnikoog kantis ĉi tiun kanton verŝajne dum *it ballast sjotten* ('la ŝovelado de la balasto', ekzemple sablo), sed oni notis la kanton kiel remistan kanton. Ĝi samtempe estis kanto pri la petolaĵoj de la kurioza samvilaĝano Hero.

15. Fan scipes bisettinghe

Teksto: el la manuskripto de Fivelgo (12a jarcento)

Muziko: Rutger Dijkstra

Ankaŭ ĉi tiu kanto estas Malnovfrisa leĝa teksto el la 12a jarcento kiun deklamadis jura konsilisto (vd. n-ron 1). Ĉi tiu teksto priskribas kio okazu kiam kreditoro volas embargi ĵus enhaveniĝintan ŝipon. Tiam la ŝipestro transdonu al la kreditoro la rudron kiel garantiaĵon. Sed kiam la ŝipestro kontestas la ŝuldon, li rajtas ĵuri ke li nenion ŝuldas al la kreditoro. Tiam la garantiado ne devas okazi.

Produktado: Kapriol'!

Teknikaĵoj: Ad Bos

Registrado: Ad Bos, tRbandstudio, Frislando 2015

KD-libreto: Marita Kruijswijk (teksto) kaj Ad Bos (paĝaranĝo)

Kovrilo: Rutger Dijkstra

Foto de Kapriol'! je la interna flanko: Bill Spence

Revortigado de Malnovfrisaj kantotekstoj al la moderna Frisa lingvo: Bertus Klazinga, Marian Nesse kaj Eric Hoekstra (n-ro 3) de la Frisa literatura revuo Ensafh.

Multan dankon:

- Al Partners Project Grundtvig 2013-2015 de Eŭropa Unio kaj al la fondaĵo Edukado.net pro ilia subteno
- Al Katalin Kaváts de la fondaĵo Edukado.net pro ŝia senlaca laboro por realigi ĉi tiun projekton
- Al Henny Kolk pro la tradukado de la KD-libreto en la Frisan
- Al Roel Haveman pri la readukado de la libretto al Esperanto
- Al Bolk Wahlstrom pro la tradukado de la KD-libreto en la Anglan
- Al Roel Slofstra, Henriëtte Pieperiet-van Bon, Oebele de Vries kaj la kunlaborantoj de Tresoar kaj de Fryske Akademy (i.a. Beart Oosterhaven) pro ilia helpo!